

V 14624 / (86) 1989

# ETA



**1-2/1989**

MONATA REVUO  
FONDITA  
EN JARO 1903

OFICIALA ORGANO  
DE I.K.U.E.  
INTERNACIA  
KATOLIKA UNUIGO  
ESPERANTISTA

# espero katolika

**JARKOLEKTO 86 - N. 810-811**

**JANUARO-FEBRUARO 1989**

*Sur la kovrilo: Patrino Tereza.*

Saluton, karaj Legantoj novaj kaj malnovaj!

Nova jaro komenciĝis, kaj ni daŭrigas niajn klopodojn, por ke Espero Katolika plu estu amiko modesta kaj honesta, varia kaj interesa, sincere kristana kaj malfermita al la mondo.

La Monda Tago por Paco (1.1.1989) kaj la preĝosemajno por kristana unueco (18-25.1.1989) karakterizas ĉi tiun jarkomencan. Por la venontaj monatoj ni anoncas, interalie, felietonan historion de la kristanismo.

Dum ni renovigas niajn bondezirojn por la nova jaro, ni memorigas, ke la prospero kaj nivelo de nia revuo povas dependi ankaŭ de via subteno kaj kunlaboro. Dankon!

### *La Redakcio*

Periodico culturale mensile - gruppo III  
pubbl. inf. 70% - Gratis ai soci.  
Monata kultura gazeto

**I. K. U. E.**

**INTERNACIA KATOLIKA UNUIGO  
ESPERANTISTA**

*Honora Prezidanto:*

**Sac. Alfons Beckers**  
Rozenlaan, 5  
B - 3950 Beringen (Belgio)

*Prezidanto:*

**Sac. Duilio Magnani**  
viale C. Zavagli, 73  
I - 47037 Rimini/Forlì, Italio

*Unua Vicprezidanto:* **Sac. Lajos Kóbor**, H-9372  
Csapod, Hungario

*Dua Vicprezidanto:* **Sac. Franjo Gruić**, Strossmayerov  
trg 5, YU-54400 Djakovo, Jugoslavio

*Sekretario-Kasisto:*

**Antonio De Salvo**

*Estraro:*

**A. Beckers, A. Casey, A. Ciccanti, R. Degrelle, A. De Salvo, R. Forycki, F. Gruić, L. Kóbor, J. Kondor, J. Korytkowski, B. Pochanke, R. Ruaro, S. Szénási**

*Plenumkomitato:*

**Aŭstrio:** Mudrak; **Belgio:** Poterucha; **Ĉeĥoslovakio:** Dlugi, Svàček; **Francio:** Bourdon; **F. R. Germanio:** Eichkorn; **Hispanio:** Casanoves; **Hungario:** Kaszab; **Italio:** Cadei; **Jugoslavio:** vakas; **Nederlando:** Smits; **Pollando:** Kos; **Svislando:** Bommer; **Usono:** Laughery

*Centra Oficejo:*

Via Berni, 9  
I - 00185 Roma (Italio)  
tel. (06) 7588388  
poŝta konto 23290000  
Direktoro: **Antonio De Salvo**

*Oficiala organo:*

**Espero Katolika**

*Kotizo:*

22 svisaj frankoj aŭ egalvaloro

*Registriĝo ĉe la Tribunalo de Romo*

(Registrazione presso il Tribunale di Roma)  
n. 17138, 11-2-1978

*Respondeca Direktoro (Direttore Responsabile):*

**Antonio De Salvo**  
C.P. 4017 Appio, I-00100 Roma RM, Italio  
tel. (06) 7810782 (vespere)

*Redaktoraro:* **Sac. Battista Cadei, Antonio De Salvo**

*Presejo (Tipografia):*

**ROTATORI**  
Viale Manzoni, 22/b - Roma

**18-25 januaro: Preĝado por Unueco de Kristanoj**

## **UNU KORPO EN KRISTO, TIO ESTAS: UNUECA KRISTANARO**

Ciuj kredantoj en Kristo estas vokitaj fariĝi unu nura familio kunligita per la amo. Ĉiujare la diversaj kristanaj konfesioj kaj komunumoj estas invitetaj soleni specialan semajnon de intensa preĝado kaj klopodado por rekonstrui la unuecon interne de la komunumoj mem kaj rilate kun la aliaj kristanaj grupoj.

La ĉi-jara temo de la preĝo-semajno estas: *"Konstrui la Komunumon: unu Korpon en Kristo"*, kaj ĝi deiras el la Bibliaj vortoj:

*"Ni multaj estas unu korpo en Kristo  
kaj ĉiuj aparte membroj unu de alia;  
kaj ni havas diversajn donacojn,  
laŭ la graco al ni donita" (Rom 12,5-6a).*

La apostolo Paŭlo eluzas la faman apologon pri la korpo kaj ties membroj, por klarigi la rilatojn, kiuj devas validi inter la kristanoj, por formi unu nuran komunumon, por kies konstruo devas kontribui ĉiu unuopa ano de Kristo per siaj apartaj ecoj.

Fronte al la nekristana mondo, kia sin prezentas la kristanaro? Disframentiĝinta! Katolikoj, ortodoksoj, anglikanoj, luteranoj, kalvinanoj, kaj aliaj grupoj kaj grupetoj, ĝis la sektoj. Krome, eĉ interne de ĉi tiuj konfesioj estas disiĝoj. En la katolika Eklezio antaŭ kelke da monatoj ĉefepiskopo Lefebvre rompis la unuecon kun la papo kaj kun la katolikaj episkopoj; en la anglikana Komunumo la problemo pri la virina pastreco riskas esti skismon; ade estiĝas novaj sektoj, kiuj foje akre batalas kontraŭ la tradiciaj konfesioj.

Dum la preĝo-semajno (18-25 januaro) ni ĉiuj estas vokitaj preĝadi kaj konsideri ke, kiel en homa korpo ĉiuj diversaj membroj estas same gravaj por ĝia harmonia funkciado, tiel la unuopulaj ecoj, donacoj kaj karismoj devas kunlabori por la konstruado de niaj paroĥoj kaj komunumoj en la amo. Do: ne forĵeti, sed harmoniigi la diversaĵojn.

Sammaniere en la rilatoj inter la diversaj konfesioj: oni ja devas eviti kompromisojn, sed samtempe oni devas akcepti kaj harmoniigi la aŭtentikajn valorojn de ĉiuj: la evangelian fidelecon de la protestantoj; la mistikecon de la ortodoksoj; la universalecon kaj "enkarnecon" de la katolikoj; la sektemon de iuj sektoj...

Iam iu diris: ortodoksoj estu vere ortodoksaj (tio estas, ĝuste-kredaj), kaj katolikoj vere katolikaj (tio estas, universalaj), kaj tiam la protestantoj ne plu protestos.

Per konstanta strebado al mempurigo kaj aŭtentika Kristo-sekvo; per reciproka respekto pri diverseco de tradicioj kaj sentemoj, kaj per ĉi-cela preĝado, ni kontribuos konstrui la kristanaran komunumon kiel unuecan korpon de Kristo.

## "AMAS DI' MALPLENAJN MANOJN KAJ LA MANKO IGAS GAJNO"

(*Meditado al la laŭdanto de Maria: Luk 2,46-55*)

Per ĉi tiuj vortoj komenciĝas la dua strofo de la poemo "*La ĉiela kalkulado*" de Werner Bergengruen, germana poeto kaj verkisto (1892-1964). Tre ofte mi pensas pri tiuj vortoj, se mi preĝas aŭ kantas la laŭdkanton de Maria.

Maria, la humila sklavino de Dio, staras antaŭ sia Dio kun malplenaj manoj. Ŝi scias pri tio, ŝi akceptas sian situacion. Sed ŝi ankaŭ scias, ke Dio donacas ĉion al ŝi, kaj ŝi ankaŭ atendas ĉion de Li.

Maria, la patrino de Filo de Dio, la patrino de Jesuo Kristo, iras senprokraste al Elizabeta, sia parencino, por helpi ŝin. Maria aŭdas kaj agas. Elizabeta laŭdas Marian, laŭdas ŝian kredon, ŝian fidon. Sed Maria scias sin mem sklavino de Dio, kiu spertis kaj spertas la gracon kaj la korfavoron de Dio. Pro tio ŝi devas kanti kaj laŭdi la grandecon de Dio, laŭdi Dion. Ŝi jesis la mision de Dio kaj obeas Lin. Ŝi ne konas la vojon, tra kiu Li gvidos ŝin. Nur kredante, fidante, ŝi scias, ke ĉiuj generacioj nomos ŝin feliĉa. Malgraŭe, ŝi restas la humila sklavino de Dio, kiun oni ne komprenas, miskomprenos.

Ŝi partoprenos en la sorto de sia Filo Jesuo Kristo. Jozefo, ŝia fianĉo, estas la unua, kiu suferas pri la nekomprene, kaj kiu bezonas la helpon de Dio kaj Lian klarigon por kompreni Marian. Kaj ankaŭ nia tempo miskomprenas Marian kaj la dian planon kaj agadon pri Maria. Dio sendu ankaŭ al nia tempo klarigon!

Maria fidas je Dio kaj scias sin mem ŝirmata kaj rigardata de Dio. La generacioj nomos ŝin feliĉa ne pro ŝiaj meritoj, sed pro la graco de Dio. Li, kies nomo estas sankta, Li faras ĉi tiujn grandaĵojn al ŝi, ĉar ŝi lasas Lin verki. Ŝi pie timas la Plejpotenculon, ŝi estas malfiera, humila antaŭ Li, ŝi malaltigas sin mem antaŭ la Plejpotenculo, ŝi konas sian malsaton kaj sian malriĉecon. Ŝi spertis kaj scias, ke ĉi tiu estas malgranda antaŭ Dio. Sed ŝi ne ribelas kontraŭ Dio kiel Adamo, ŝi malfermas siajn plenajn manojn, por ke Dio plenu ilin.

Kial ŝi staras antaŭ Dio tielmaniere? Maria vivas el la fido kaj kredo de la popolo Izraelo, kiu rajtas sperti la ĉeston de Dio dum la tuta historio, precipe dum la tempoj de mizero. Kiel ano de la popolo Izraelo ŝi konfidis je la fideleco de Dio kaj scias, ke "*Dio multafoje kaj maltammaniere parolis en la tempo antikva al la patroj en la profetoj*" (Heb 1, 1). Maria firmiĝis en ĉi tiu fido. Pro tio ŝi nun kapablas jesi la Dian mision.

Kaj ni? Ĉu nia fido estas ankaŭ sufiĉe granda, profunda, ke ni povas jesi la mision de Dio al ni? Ankaŭ ĉiu el ni estas vokata de Dio al sia propra misio, sia propra tasko. Ĉu ni estas pretaj malfermi niajn manojn, por ke Dio plenigu ilin? Aŭ ĉu ni ne povas malteni ĉion, kiu malhelpas nin obei la Dian alvokon? Ni lernu de Maria, kiu estas unu el ni. Maria helpu nin, konfidi je la Dia korfavoro, la amo de Dio, kiu aperis en Jesuo Kristo, kiun naskis Maria, la Virgulino.

*Fratulino Theotima Rotthaus, F.R. Germanio*

---

## HO DOLĈA SINJORO

Ho dolĉa Sinjoro!  
Mian preĝon aŭskultu.  
Faru ke mia koro  
estu amoplena,  
mian menson Vi konduku  
per la lumo de la kredo.  
Forigu la dubon  
de mia pentinta koro,  
igu min inda  
je via granda amo.  
En vi, ho Sinjoro,  
mi esperas kaj fidas:  
mian preĝon aŭskultu,  
dolĉa mia Sinjoro!

- *Silvia Brovelli, Italio; trad. B. C.*

---

● « Jesuo diris: Mi gloras vin, ho Patro, Sinjoro de la ĉielo kaj de la tero, ke tion vi kasis for de saĝuloj kaj prudentuloj, kaj malkasis al infanoj » (Mat 11, 25).

Unu el la plej skuaj kaj plej konsolaj veroj de la evangelia bon-mesaĝo estas ke antaŭ Dio eĉ la plej etaj kaj laŭdire plej sensignifaj homoj estas dignaj kaj valoraj, kaj ke la mirindaĵojn de la Dia amo pli multe komprenas la simplaj, la senpretendaj, la malkleraj, kaj malgrandaj, ol la laŭdire grandaj homoj de la mondo.



## LITANIO AL SANKTA ANTONO

La 20-an de septembro 1987 mortis en Pollando, en sia 81-a vivojaro, Roman Brandstaetter: judo, polo, kristano, eminenta verkisto, poeto kaj dramaŭtoro, vera amanto de Kristo kaj spertulo pri la Sankta Biblio. Jen unu el liaj poemoj:

La mondo estas veturilo kun fojno,  
kiel sur triptiko de Hieronimo Bosch:

Sankta Antono.

Ni perdis sencon de l' vivo,

la kredon,

l' esperon,

mezuron de ĉiuj valoroj

kaj nin mem.

Kiel ni nin retrovu,

Sankta Antono?

Kiel?

Kie?

Ni serĉas nin en oro,

en brilantoj,

en ŝparkasaj libroj,

en borsoj similaj al frenezulejoj,

en bankaj kiraskestoj,

en abundaj manĝo-provizejoj,

en mallumaj keloj de niaj deziroj,

en narkotaĵoj,

en brando,

en forkapto de homoj,

en murdo de homoj,

en burokratismo,

en alpremado de senutilaj stampiloj,

en ebriiĝo per povo.

Moviĝas veturilo kun fojno,

veturas...

Ĉiu volas preni el ĝi

pajloŝalmon.

Plej grandan ŝalmon,

aŭ etan almenaŭ.

Sankta Antono,

sankta trovinto de kudriloj en fojno-stako,

instruu nin trovi la konsciencon,

kiun ni perdis,

eĉ ne sciante pri tio.

Moviĝas veturilo kun fojno.

Veturas . . .

kiel sur triptiko de Hieronimo Bosch.

*R. Brandstaetter, trad. Johano Kos*

## **ENKONDUKO EN LA KRISTANISMON (14)**

### **Interparoli kun Dio**

Pluraj estas la manieroj de spirita renkontiĝo kun Dio: la legado kaj aŭskultado de la parolo de Dio, la sakramentoj, la meditado kaj la preĝado, la laboro kaj la sindono por servi al la fratoj.

La preĝado estas la unua respondo de la homo, kaj speciale de la kristano, al la donacoj de Dio. Ĉar la homo nenion povus en la spirita vivo sen la helpo de la graco de Dio, la Sankta Spirito mem estigas en li la inspiron al preĝado. Tiel Dio estas ĉe la komenco kaj ĉe la fino de la preĝado, kiu enkondukas en la intimecon kun la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito.

La kristana preĝo havas tri ĉefajn formojn: adorpreĝo al Dio Kreanto kaj Patro; pet-preĝo, per kiu oni prezentas al Dio bezonojn siajn kaj aliulajn; dank-preĝo pro la ricevitaj donacoj. La kristano preĝas ankaŭ por la surteraj bezonoj, sed kun la konscio ke preĝo ne anstataŭas klopodadon, aŭ uzon de naturaj rimedoj, kaj ne celas servigi al si la Dian potencon, kvazaŭ magiaĵon. Ankaŭ estas antikva kaj sankta en la kristanismo la preĝado por la mortintoj, por esprimi fratecon kun ili, kaj peti ke Dio purigu ilin el la kulpoj kaj ilin akceptu en sian pacon.

La preĝo plej kara al la kristano estas « *Patro nia* », kiun instruis Jesuo al siaj disĉiploj, kaj per kiu la kristano sin turnas al Dio kiel filo al patro. Post Dio, la kristano preĝas ankaŭ al la sanktuloj, tio estas tiuj, kiuj jam estas ĉe Dio, kun sentoj de respekto, fidante je ilia frateca propeto.

Inter la sanktuloj privilegian rolon havas Maria, kiun la kristano amas filece, ĉar ŝi estas la patrino de Jesuo, kiu estas nia frato. Al Maria la kristano ofte sin turnas, preĝante ŝin per la evangeliaj vortoj *Saluton Maria*.

Krom individua preĝo, ĉiu kristano partoprenas diversmezure en la liturgio (= publika preĝo) kiun la Eklezio (= kristanaro) faras al Dio, en unueco kun Kristo kaj kun ĉiuj sanktuloj. En la liturgio la kristano preĝas ennome kaj favore de la tuta kreaĵaro en unueco kun la tuta kristana familio. Plejeminenta liturgia preĝo estas la sankta Meso.

Legante aŭ aŭskultante la Bibliion, la kristano konscias, ke li trovas en ĝi la voĉon de Dio mem, kiu lin vokas kaj gvidas. La sankta Skribo, kvankam ĝi raportas pasintaĵojn, kiel ekzemple la historion de la antikva Izraelo, la vortojn de Jesuo, la mesaĝon de la apostoloj, tamen havas daŭran aktua-

lecon por ĉiu kristano, kaj eĉ por ĉiu homo. Kompreneble, por ke ĉi tiu renkontiĝo kun Dio en la sankta Skribo estu fruktodona, necesas helpo de la Sankta Spirito de Dio. Por ĝin ricevi oni bezonas animon preĝeman kaj lerneman: tiam Dio lumigas la menson kaj fortigas la koron de kristano.

La medito, aŭ mensa preĝo, rekomendindas al la kristano, ĉefe al tiu kiu elektis religian vivo-staton. Ĝi estas ekzerco al disiĝo for de la surteraj zorgoj, klopodo al spirita supreniĝo, kaj pripenso de la bazaj veroj de nia savo. Tiam la menso absorbiĝas en personan sindevigan interparolon kun Dio, koncerne la celadon de nia tuta vivo al li. Tiu, kiu estas fidela al la praktiko de meditado, povas ricevi de la Spirito de Dio la donacon de la kontemplado, kiu ebligas spontanen kaj ĝojoplenan unuiĝon kun Dio.

### Proponoj

- 1) *Legi* Luk 10,38-11,13 (pri preĝado); Kol 3,5-17 (admonoj por kristana vivo).
- 2) *Legi* ofte la Bibliion (komence oni preferu la Novan Testamenton).
- 3) *Preĝi*: Via parolo, ho Dio, estu mia gvidilo.

P.R. - B.C.

---

## LA APUDVOJA KAPELETO

La malproksima

atendas

ĉe vojkruciĝo

kiu

alportos

plenbrakon

da bona volo

amasigita

dumvoje

flamigos

lumon

de pensmaniero

recitos

litanion

da verkoj

plenumitaj

kaj nerealigitaj

ekkantos

per silento

la MAGNIFIKATON

ĉe muziko

de la kaŝita

grilo

plenigos

la internon

ĝis la lasta

loko.

*Helena Stosio, Pollando*



## SANKTA-VENDREDA MALLUMO

Tri evangeliistoj (Marko, Mateo, Luko) raportas, ke en la tago de la krucumado de Kristo, de tagmezo ĝis la 15-a horo, mallumo kovris la ĉielon, kaj poste terura tertremo skuis la regionon.

Al la nuntempa homo tuj prezentigas la problemoj: ĉu mencias ĉi tiun okazon ankaŭ aliaj, nekristanaj aŭtoroj? Kaj se jes, kiel ili priskribas ĝin?

Franca historiisto Bossuet atentigas pri du grekaj aŭtoroj: Tallos kaj Phlegon. El iliaj verkoj restis nur fragmentoj, cititaj de aliaj aŭtoroj.

Tallos estis eksa sklavo de la romia imperiestro Tiberio (43-47). El lia verko citas mallongajn partojn Julio la Afrikano (vivinta en la 3-a jarcento). Ĉi tion ni povas legi de li:

*"En la unua jaro de la 203-a Olimpiado, kiam Kristo suferis krucmorton, mallumo nubigis la teron kaj tertremo disfendis la rokojn..."*

Sklavon Phlegon emancipis la imperiestro Hadriano. En lia kroniko estas legebla la sekvonta parto:

*"En la kvara jaro de la 202-a Olimpiado estis tia eksterordinara suneklipso, kia ankoraŭ ne estis vidita sur la tero. En la sesa horo (tagmeze) estis tia malluma punkto, ke oni povis vidi la stelojn. En Bitinio (nordokcidenta parto de nuna Turkio) okazis detrua tertremo, kaj urbo Niceo (nuna Iznik) preskaŭ tute ruinigis"*.

La malnovaj Olimpiadoj komenciĝis en junio-julio, tempe de la unua somera plenluno, do la jaro laŭ nia nuna koncepto (de januaro ĝis decembro) koincidis kun du olimpiadaj jaroj. Ĉi tiel la notoj de Tallos kaj Phlegon ne kontraŭdiras unu la alian: ambaŭ parolas pri la 33-a jaro de la kristana erao.

La ekleziaj Patroj kaj la unuaj kristanaj historiistoj, kiuj ofte citas la verkojn de Tallos kaj Phlegon, ĉiuj certigas la realecon de ĉi tiuj okazintaĵoj. Origeno, Eŭzebjo kaj Malalas historiistoj, diakono Paŭlo, apologiisto Tertuliano asertas tion, ke la mallumo kaj tertremo, kiuj plenumiĝis en la tago de la morto de Kristo, vere estis tiel kaj tiutempe, kiel priskribis ilin Tallos kaj Phlegon.

La astronomiaj klarigoj estas nur supozoj.

Sankta-Vendrede unu asteroido estus krucinta la orbiton de la Tero ĉirkaŭ la Suno, kaj estus restinta daŭre ĝis 3 horoj inter la Tero kaj la Suno. Se la dimensioj estis proksimume identaj, la homoj kredis, ke ili vidas Lunon.

M. Dolfus, direktoro de la Meudon-a astronomia observejo, kiu same akceptas la asteroidan teorion, tiel opinias, ke unu aŭ pliaj "vojaĝkolegoj" de ĉi tiu asteroido defalis kaj faris tertremon. Ni kredantoj rajte povas pensi, kune kun sankta Hieronimo: *"La tuta naturo, la tero kaj la ĉieloj, kune kun kelkaj starantaj homoj ĉe la kruco, volis fari ateston pri la morto de Mesio"*.

Sándor Termes, Hungario

## LA KRUCO DE KRISTO

Al mond' en fier' kaj spirita malhelo  
denove eklumis sur paska ĉielo  
la signo de l' venko kaj savo, ho nia konfido:  
la Kruco! La Kruco de Kristo, la Dia Safido.  
La Kruco de Kristo nin ĉirkaŭ si ĉiujn arigas:  
la Sango de Kristo nin, samajn gefratojn, kunligas;  
en mond' de malamo, avido kaj vanto  
ne sekvas al Kristo, la Dia Gvidanto,  
al celo eterna: spirite armitaj  
de amo kristana en kor' instigitaj!  
Por Lia la regno ni marŝas kun kredo rok-forta  
por Dio eterna kaj homa animo senmorta.

*Walter Mudrak, Aŭstrio (1940)*

---

## SUB LA KRUCO

En la vespero de la Sankta Vendredo,  
Patrino de ĉiuj patrinoj,  
oni demetis sur viajn genuojn  
la korpon de via Filo,  
    kiel tutpaĝe malfermitan libron,  
    kie vi senpene legis  
    la rakonton de amo, kiu iris  
    ĝis la fino de si mem.  
Apud vi, dolorpatrino,  
Silente mi ekgenuiĝas.  
Via tiama suferado  
estis farita de tiu de via Filo,  
    sed ankaŭ de la suferoj  
    de la ĉiutempa homaro.  
Car, antaŭ ol morti,  
Li donis vin, kiel patrinon, al ĉiuj homoj.

*El "Preĝo por la tempo de malsano"  
(traduko aperinta en Franca Katolika Esperantisto)*

Vesperigis, ili altabligris. Dum la manĝado « J » diris: « Vere mi diras al vi, ke unu el vi, kiu manĝas kun mi, perfidos min ». Tiam ili tristiĝis kaj demandis unu post la alia: « Ĉu eble mi?... ». Sed Li jene respondis: « Unu el la dekdu, kiu trempas kun mi en la pladon ».

Kaj tio jene okazis.

Tiunokte Li estis forportita.

Tio ankaŭ aliokaze ripetigis. Ĉiufoje, kiam ili sidiĝis al la sama tablo, unu el ili estis perfidita. Ĉiam kunulo perfidis kunulon. Tio fariĝis jam kutimo.

De tempo al tempo ilia societo kreskis. Venis novaj disĉiploj, novaj kreduloj, do novaj perfidontoj kaj perfidotoj. Ili manĝis el komuna telero senpeke kaj sensuspekte. En paco.

Sed la perfido neniam forrestis.

« J » kun dornokrono surkape, kun la peza lignokruco sur sia nuda ŝultro vundita de skurgofrapoj ek- kaj ek-ŝanceliĝis sur la ŝtona vojaltiĝo. Laŭrande de la vojo homamaso tumultis kaj gapis al la kondamnito kun sangokovrita fruntio, inter la armilhavaj soldatoj.

« Kiu estas LI? » demandis vojaĝanto laŭaspekte komercisto, kiu ĝuste tiam alvenis kaj puŝiĝis al la homamaso. La ondanta hommulto malhelpis la pluiradon. Li stariĝis sur piedpintoj por vidi ion super la kapoj.

« Do, vi ne scias?! La Nazaretano... ».

« Ha, do jene! ». La komercisto kapbalancis, sed aperis liavizaĝe la nescio pri kiu oni parolas. Li hontis demandi plu pri Li, nur tion diris: « Ĉu oni krucumos Lin? ».

« Ho jes! Li estos krucumita kune kun tiuj du latronoj! ».

« Kion malbonegan faris la kompatindulo? ».

« Nenion malbonegan. Li faris nur miraklojn. Li predikis kaj sanigis. Li estas piulo. Oni diras: filo de Dio ».

« Ni ĉiuj estas tiuj — ekĝemetis la vojaĝanto en la arda varmego, kaj per maniko de la kaftano li viŝis sian frunton kovritan de ŝvito — sed kiel mi transiru la vojon? ».

« Ĉu vi ne venos sur la Monton de la Kranio? Ĉu vi ne rigardos la ekzekuton? ».

« Ne, ne, mia amiko. Mi tenas min for de tiaĵo! Krome, mi estas negocisto kaj ne havas tempon. Tempo estas mono. Mi esperas, ke la procesio ne daŭros longtempe kaj mi atingos la urbon ».

Jam sur la Monto Li ekvidis unu el tiuj, kiuj antaŭ nelonge kriis Barabason, tie, ne fore, antaŭ la palaco de la prokuroro. La viro ruĝiĝis de honto kaj forturnis la kapon. « J » ekbedaŭris lin. Pene trenante sin pli proksimen, Li diris al li:

« Ne turmentu vin, ĉar vi ne kuraĝis krei Jesuon anstataŭ la nomon de la rabisto, en la ĉeesto de Pilato... ».

« Silentu! » frapis per la skurĝo sur lian nudan dorson la komandanto de la eskorto.

« Li parolis! » tiu homo almontris « J »-n, retropaŝante ektimege. « Mi staras ĉi tie, kaj Li provokis min. Ĉu mi ne rajtas rigardadi ĉi tie? ».

« Bone, bone » voĉmurmuris la oficiro, kaj per la tenilo de la skurĝo li puŝis « J »-n. « Ĉiu gardu la ordon! La ordo estu respektata! ».

\* \* \*

Dum la surnajligo, pro doloro Li senkonsciiĝis, kaj nur sur la kruco li reakiris la konscion.

Li estis sur la kruco super ĉiuj, en la alto. Lia korpo doloris, sed la doloro nun estis elportebla. Nur la soifo turmentis Lin.

Li ektimis. La soifo ĉiam pli forte suferigis Lin. « J » timis, ke Li devos petegi. Li petegos por akvo. La unuan fojon Li estos malforta por elporti la suferon. Tion Li ne volis. Li fermis la okulojn, kaj koncentrante sian forton Li ordonis al si: peti nenion.

« Mi soifas... ».

Tamen Li eldiris. Tamen Li humiligis sin. Li humiliĝis, antaŭ ili!

Lacopinte oni etendis al lia buŝo ĉifonon sorbigitan de vinagro.

« Jen li estas mizerikorda soldato » trafulmis lian kapon. Li tuj ekĝemis kvazaŭ Li estus mordinta fajron. Pro la vinagro liaj vundaj, sekiĝintaj lipoj eksangis.

Li kvietiĝis.

« Kvankam mi nur petis, tamen ili ne indulgis min » li pensis en si mem.

Lia fiereco malĝojigis Lin. « Kiel mi povas esti ilia Savanto, se pro la pruvo de ilia krueleco mi sentas kontentecon? Mi amas ilin! Mi devas ami ilin! Mi amas, mi amas ilin... ».

Tio li ripetadis en si mem, ĝis oni pikis per lanco al Li en la flankon.

\* \* \*

« Majstro — metis foje demandon al Li en milda, silenta posttagmezo la plej amata disĉiplo, Johano — ĉu vere vi estos krucumita? ».

« Vere... ».

Tio okazis multe pli frue antaŭ la morto, ankoraŭ en la tempo de la Instruado. Ili sidis en ombra arbareto, kaj la respondoj de la Majstro ŝajnis al li tute nekredeblaj. Johano multe pli per menso perceptis la instruojn ol per koro. Do, li demandis plu, kun iom da scivolemo.

« Ĉu tio estas via celo, Sinjoro? ».

« Ĉu la morto? La morto ne estas celo. La morto okazos ».

« Sed la morto sur kruco. La sinofero. Ĉu vi tion deziras? ».

« J » kun delikata amo alrigardis sian disĉiplon.

« Mi ne deziras, Johano. Sed pro tio mi venis sur la Teron ».

La junulo enpensiĝis. En la sablo kvarceroj brilegis ĉe la sunlumo. Facila vento alportis la parfumon de la floroj de olivarboj.

« Kaj ĉu tio ne povas okazi alie? » demandis Johano iom triste.

« Ne timu pri mi... ».

« Mi ne volas, ke vi mortu! Mi ne volas, ke oni suferigu vin! Ke oni enbatu najlon en vian korpon! Ke oni verŝu vian sangon... ».

« Do, vi volas, ke ĉiuj miaj instruoj fariĝu vanaj ».

« Ĉu ili fariĝus vanaj, se vi ne oferus vin mem? ».

« Mi mortos, sed leviĝos el la mortintoj ».

« Vi promesas? ».

« Mi mortos por esti kun vi ĉiuj poreterne. Tio estas la prezo ».

« Eĉ imagi tion estas teruraĵo — timtremis Johano — precipe en tiel bela posttagmezo. Ekzistas nek trankvilo nek paco... Ĉu vi timas, mia filo? ».

« Mi timas. Mi timas, Majstro ».

*Károly Szakonyi, Hungario; el la hungara tradukis I. Nagy*

---

★ Mi deziras korespondi. Mi havas 40 jarojn, kaj estas flegistino. Mi interesiĝas pri religio, medicino, psikologio, radioestezio, turismo. Mi ankaŭ kolektas bildkartojn. S-ino Barbara Długosz-Lewicka, ul. Sucharskiego 18/18, PL-65.562 Zielona Góra, Pollando.

★ Mi estas 25-jara studento pri teologio. Mi tre volus korespondi kun italaj amikoj. S-ro Zenon Szczachor, ul. Koszalinska 12, PL-30.407 Kraków, Pollando.

★ Mi estas 21-jara fraŭlo. Mi studas en la Politekniko de Krakovo, sed naskiĝis kaj loĝas en malgranda urbo. Mi ŝatas ludi gitaron kaj kanti pri vivo kaj amo. Mi deziras korespondi. F-lo Krzysztof Laba, ul. Bat. Chłopskich 17 A, PL-38.401 Krosno, Pollando.

**1-a de januaro 1989: 22-a Monda Tago por Paco**

## **"SE VI VOLAS PACON, RESPEKTU MINORITATOJN"**

La ĉi-supra slogano resumas la temon de la ĉi-foja 1-a de januaro, la komenca jartago en kiu la homoj reciprokas bondezirojn, kaj kiu ekde 1968 estas proklamita *Monda Tago de Paco*, por ke la bondezirojn akompanu konkretaj klopodoj por konstrui pacon. La iniciaton lanĉis la Roma papo Paŭlo la 6-a, kaj ĉiufoje la pactagon markas unu diversa temo, kiu atentigu pri unu aparta aspekto de la packonstruo, ekz. justeco, libereco, solidareco... kaj ĉijare: respekto al minoritatoj (tio estas, malplimulto).

Tre ofte kaj multloke la minoritatoj — etnaj, lingvaj, kulturaj, religiaj ktp — estas subpremataj kaj diskriminaciataj. Se ni konsideras la aktualajn konfliktojn en la mondo, ni povas konstati, ke plejgranda parto de ili estas inter plimulto kaj minoritatoj.

Jen kelkaj ekzemploj: la negroj kaj la hispanlingvanoj en Usono; la indianoj en Brazilo; la almigrintaj azianoj kaj afrikanoj en Eŭropo; pluraj minoritataj triboj en Afriko; la landidoj en Aŭstralio; la alireligianoj en iuj islamaj landoj; la ciganoj preskaŭ ĉie.

Foje la persekutatoj en unu regiono, ĉar minoritataj, fariĝas persekutantoj aliloke, kie ili konsistigas plimulton.

Kie minoritatoj estas malŝatataj, tie vera paco ne eblas; ne nur la leĝaro sed ankaŭ la kulturo, la penso-maniero kaj la esprimomaniero devas esti respektemaj por ĉiuj homaj grupoj, eĉ malgrandaj, pro la konscio ke ĉiuj homoj estas egalrajtaj kaj egaldignaj, kaj ke ĉiu grupo portas unikajn spiritajn kulturajn valorojn, utilajn al la tuta homaro.

Siaflanke la kristanoj devas memori, ke Dio vokis ĉiujn homojn "*el ciu raso, kaj gento, el ĉiu nacio kaj lingvo*" (Apo, 5/9) sendiskriminacie, por ke ili konsistigu unu nuran familion.

B.C.



# SOLENA DEKLARACIO DE LA INDIĜENAJ POPOLOJ

En rilato kun la temo « respekto al minoritatoj », ni publikigas la ĉi-suban dokumenton de reprezentantoj de indiĝenoj, kunvenintaj en Ekvadoro en 1984.

*Ni, indiĝenaj popoloj de la mondo, kuniĝinte en ĉi tiu parto de la patrino tero, en granda asembleo de saĝuloj, deklaras al ĉiuj nacioj:*

Ni grandlaŭdas nian honorindan paseon,  
kiam la patrino tero estis nia nutraĵo,  
kiam la malluma nokto formis nian ŝirmaĵon,  
kiam ĉielo kaj luno estis niaj patroj  
kiam ni ĉiuj estis gefratoj,  
kiam nia vasta civilizacio kreskis sub la suno,  
kiam niaj estroj kaj pliaĝuloj estis grandaj gvidantoj,  
kiam justeco markis la leĝojn kaj ties ordonojn.  
Sed aliaj civilizacioj alvenis:  
kun soifo al sango, oro, tero kaj ĉiuj ĝiaj riĉaĵoj,  
levante per unu mano la krucon  
kaj per la alia la glavon,  
ne konante nek atentante, ne lernante la morojn de  
niaj mondoj.  
Ili taksis nin malsupraj ol bestoj,  
ili rabis niajn terojn, kaj delokigis nin for de ili,  
ili transformis nin, idojn de la Suno, al sklavo.  
Tamen ili ne sukcesis ekstermi nin,  
nek igi nin forgesi, kiuj do ni estas,  
ĉar ni estas la kulturo de la tero kaj de la ĉielo.  
Ni estas antikva idaro, kaj ni estas milionoj;  
malgraŭ ke nia tuta universo estas detruita,  
nia gentaro vivos pli longe ol la imperio de morto.  
Ni kunvenis el la kvar anguloj de la mondo  
por deklari fronte al ĉiuj nacioj  
ke ni estas indiĝenaj popoloj,  
ni ĉiuj havas konon de kulturo kaj naciecon;  
ni scias kie landlimas ĉiu lando;  
leviĝante post jarcentoj de subpremado,  
elvokante la grandecon de niaj prapatroj,  
memorige de niaj indiĝenaj martiroj,  
omaĝe al la konsilo de niaj saĝaj olduloj,  
ni solene promesas  
rekapti nian destinton per niaj manoj,  
reakiri nian kompletan homecon,  
nian orgojlon, ke ni estas indiĝena gentaro.

*Ekvadoro, 14.4.1984*

## KIAL CIGANINOJ KAPABLAS DIVENI

Kie estis, kie ne estis, unu malgranda vilaĝo estis en unu angulo de la granda mondo. Fine de ĉi vilaĝo vivis unu vidvino kune kun sia filino. La malriĉa virino iris al la vilaĝo por purigi. Ĉi tiel ŝi vivtenis sin kaj sian filinon.

Kiam la homoj kondukis Kriston al krucumado, kaj la insultanta friponaro alvenigis la Diofilon antaŭ ŝian kabanon, pro la peza kruco Kristo falis sur la genuojn. La malriĉa virino tre bedaŭris, ankaŭ ŝi ĵetis sin sur la genuojn, kaj tiel ŝi glitis proksimen al Jesuo, prenis la tukon de sur sia kapo, kaj diris tion:

— *Ho, Sankta Dio, pardonu ilin, ĉar ili ne scias, kion ili faras kun vi! Vi estas la Filo de Dio, nia Savanto la Sankta Filo, pardonu kulpojn al ili, kaj pardonu ankaŭ mian kulpon!*

Kaj ŝi etendis sian tukon al li:

— *Viŝu la ŝviton de sur via vizaĝo, mia Sinjoro!*

Kristo rigardis je ŝi kaj diris tion:

— *Veronika, Veronika, certe mi diras al vi, sankta virino vi fariĝos, kaj baldaŭ vi vivos en la ĉielo! Vi forgesos la malriĉecon de la tero, ĉar vi riĉa estos en la ĉiela mondo! Per ĉi tiu tuko, se vi ektuŝas malsanulon, tiu tuj resaniĝos, nur li kredis min kaj miajn vortojn.*

Kaj li redonis la tukon.

Kiam la malriĉa virino alrigardis sur la tukon, ŝi preskaŭ paraliziĝis pro la timo, ĉar sur ĝi ŝi vidis la vizaĝon de la Diofilo. Ŝi bone kaŝis ĝin en sian bruston, poste hejmeniris. En la malgranda kabano ŝi surgenuiĝis sur la teron, kaj diris belan preĝon al Dio, ĉar granda estas la volo de Dio!

Foje, vizitante la vilaĝon, ŝi atingis unu domon, kie ĵus mortis unu malgranda knabeto. Lia patrino tre ploris, kaj tiam la bonanima Veronika rememoris tiun tukon, per kiu Kristo viŝis sian vizaĝon. Ŝi hejmeniris preni ĝin, kaj per ĝi ŝi ektuŝis la mortintan knabeton.

Dum tiu momento la knabeto eksidiĝis kaj petis manĝi. Li reviviĝis.

La famo de la miraklo disvastiĝis tra la tuta mondo. De ĉie la homoj venis al ŝi. Ili tiel staris en vico antaŭ ŝia kabano, kiel en la preĝejo. La malriĉa virino ricevis tiom da donacoj, ke ŝi jam ne havis kie ilin meti, kaj ankoraŭ estis portataj ŝafoj, bovoj, ankaŭ ĉevaloj. Ŝi riĉiĝis!

Poste ŝi vizitis plurajn landojn, ĉar ŝi estis la plej granda divenistino en la mondo, kaj povis kuraci ĉiun. De tiu tempo povas diveni la ciganinoj. Ili ellernis la diven-arton de ŝi.

Veronika instruis diveni ankaŭ al sia filino. Ili ankoraŭ nun vivas, se ili ne mortis.

*Rekontis (1980) G. Varga, 64-jara cigano el Nagyvárad, Rumanio; kolektis K. Bari; tradukis S. Termes, Hungario.*

## DU FRATOJ

Mi vidis du fratojn, nur unu fojon mi ilin vidis. Mi ilin renkontis sur la strato de granda urbo. Unu el ili estis junulo de dudek jaroj aŭ iom pli; alia estis knabo dek aŭ dek unu.

Ili ien rapidis, kiel ĉiuj ĉiam en grandaj urboj.

Strangaj ili ŝajnis al mi en bruo kaj lumo de l'urbo.

Ili ŝajnis vidi nenion, nek homojn rapide pasantajn, nek tramojn rapidege kurantajn, nek brillumigitajn fenestrojn de l' belaj domegoj.

Ili ambaŭ ŝajnis pensi pri io, forgesinte pri ĉio kaj ĉiuj.

Kaj jen mi vidis kiel la knabo ekpemis la manon de sia frato, kaj jen mi aŭdis kiel li diris al li:

«Frato, aĉetu por mi malgrandan hundidon.»

«Por kio bezonas vi ĝin?» demandis la frato iom mirigite.

La knabo respondis mallaŭte:

«Gi amus min pli ol vi kaj aliaj.»

Kaj jen mi vidis kiel ia ombro kovris la altan frunton de la junulo, mi vidis kiel ekstremitoj dufoje la malsupra makzelo kaj liaj iom ekpaliĝintaj lipoj ion sensone ekflustris.

Tio ĉi estis jam antaŭ longe. Mi memoras nek la urbon nek la tempon, sed, ofte, tre ofte, kun stranga dolora persisto mi penas diveni kion ekflustris tiam iom ekpaliĝintaj lipoj, kial ekstremitoj dufoje la malsupra makzelo. Kaj ofte, tre ofte, mi ankaŭ kaptas min mem je ripetado:

«Frato, aĉetu por mi malgrandan hundidon, ĝi povus ami min pli ol ili... ».

El: *Velkintaj Folioj*, de Eroŝenko.

---

## HOMET',

en ĉiam tro-labor'

skrib-table vidis kun horor'

gravaĵojn kaj urgĵojn ajn.

Tuj-do komencis li barakti

kaj ĉiujn stokojn retro-trakti.

— Ruk! Jen por vi gajiga gajn':

tut-surpriz, ha, en ĉi-semajn'

ĉi tiu skrib' al vi celante.

Se vi ĝin traktos nun galante,

memoru, hom', alia nun

sopiras vane al fortun'.

*Bernhard Eichkorn, F.R. Germanio*

## PLEDO POR LA LITERATURO

En EK 4/88 du skribaĵoj vekis mian interesigon. La unua: « *...la ĉikontribuaĵoj, kiujn ni ricevis, estas tradukaĵoj. Kion fari? Ni atendas konsilojn (pardonu: originalaĵojn!). La Redakcio* ». La alia estis la artikolo de K. Szczurek, *Pledo por la kulturo*. Intertempe mi ricevis la majan numeron, en kiu legiĝas nova redakcia bedaŭro: « *La beletraĵoj estas tradukitaj, ne originale verkitaj en Esperanto* ».

Ke la Redakcio atendas originalaĵojn, rakontojn, novelojn, poemojn (ĉu eble ankaŭ librojn?), tio estas akceptebla, sed iom ne komprenebla. Ĉiu popolo estas fiera pri sia literaturo, sed la kulturon de popolo pruvas ankaŭ tiuj verkoj, kiuj estas tradukitaj el la mondliteraturo. Ankaŭ en la Esperanta literaturo troviĝas originale verkitaj kaj tradukitaj verkoj. Ĉu ni ne fieras pri la esperantlingvaj tradukoj el la mondliteraturo? Estas libroj, kiuj ne estas ĉefverkoj, tamen ili estas legataj en centmil ekzempleroj kaj tradukitaj en diversajn lingvojn. Kial ne traduki en Esperanton tiujn librojn aŭ novelojn, kiuj « *fontas el la kristanaj mond-kaj vivkonceptoj* »? Kiom da verkistoj havas la movado el la centmil aŭ el la miliono da esperantistoj? Kaj la nombro de la katolikaj esperantistoj? La IKUE-anoj? Dumil? Kompreneble tio ne ekskludas, ke inter ili estu verkisto(j), sed ties probableco estas tre malgranda, sed ne malebla: sufiĉus nur unu, kiu emas verki por EK.

Mi trafolumis la Esperanto-Katalogon 1988/89, ankaŭ la ĉapitron *Religio*. Nu, la katolika Eklezio, la Mondeklezio estas tre modeste reprezentata. Jam sur la unua paĝo, el naŭ libroj sep estas eldonitaj de la Spirita Eldono-Societo. Ĉu ne valoras la penon eldoni religiajn librojn, ĉar tiujn oni ne aĉetas? Vere, ne sufiĉas nur eldoni. Oni devas organizi la vendon. Sed ne tiel: se en EK aperas recenzo pri aperinta religia libro, oni ne scias, kiom ĝi kostas kaj kie ĝi estas aĉetebla. Kiel eblas ĝin aĉeti? Ĉu ĉe IKUE? Por tiuj, kiuj hazarde troviĝas en Romo.

EK estas la oficiala organo de IKUE, legiĝas sur la kovrilpaĝo. La enhavo de kiu ajn gazeto, revuo, dependas nur de la redaktoro(j). Se la legantoj spertas, ke literaturaĵo ne aperas, neniu verkas aŭ tradukas (mi obstine sendis tradukojn, kaj se diri sincere, kelkaj el ili nur post du-tri jaroj estis legeblaj. Mi ne malesperiĝis, mi atendis pacience).

Pravas K. Szczurek, ke « *la esperantlingvaj katolikaj literaturistoj ne sukcesis krei propran tribunon* ». Mi supozas, ke li aludas en sia artikolo al « *fragmento de prozo* », ĉerpita el la romano *Klaŭdia*. Ĝi ripozas de jaroj tirkeste (la hungarlingva romano, eldonita en tri mil ekzempleroj, elĉerpiĝis en du semajnoj). Ĉu tradukita, kial ĝi estus malpli valora?

La artikolo de K. Szczurek certe pensigos multajn legantojn pri nia kulturo, kiu en Esperanto signifas la literaturon.

I. Nagy, Hungario

Mi konsentas, ke ne nur originalaĵoj, sed ankaŭ tradukaĵoj povas esti valoraj. Sed ni distingu la du aferojn! Esperanto-beletraĵo kaj Esperanto-kulturo estas pli ol nura esperantigo de nacilingvaj beletraĵoj kaj kulturaĵoj. Aliflanke oni povas konstati, ke EK akceptas ankaŭ tradukaĵojn, eĉ ne ĉiam bonkvalitajn.

Ĉiuj sendantoj de artikoloj ktp ŝatus vidi publikigita la frukton de sia peno. Tio ne ĉiam povas okazi. Fakte, la afero multe dependas de la redaktoroj, kiuj juĝas — laŭ sia (ne)klereco, (mis)sentemo kaj (mal)saĝeco — pri oportuno, aktualeco, lingva kaj enhava nivelo, supozebla intereso por granda parto de la legantaro...

Gravan rolon ludas ankaŭ la spaco: en 20-paĝa numero, 3-paĝa kontribuaĵo estas artikolego. Krome, tekstoj malklare skribitaj aŭ bezonantaj multe da prilaboro riskas prokrastigon (kaj eble malaktualiĝon kaj do... enkorbigon).

Ĉiufoje nia intenco estas elekti tion kio estas plej trafa, plej leganta, plej varia, plej oportuna... sed neniu povas nin garantii kontraŭ fuŝoj kaj eraroj.

*Battista Cadei, kunredaktoro*

---

★ **HEROLDO DE ESPERANTO**, la plej ofta kaj populara internacia gazeto en Esperanto, estas de 69 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo. 16 numeroj jare, ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikoj, kalendaro, duobla Kongresa numero ktp. *Baza jarabono 19 us. dol.* Mendu provekzempleron ĉe la redakcio: *A. Fighiera-Sikorska, Via N. Sandre 15, I-10078 Venaria R. (Torino), Italio.*

---

★ **Mi estas 41-jara instruistino pri geografio, edziniĝinta. Miaj interesoj estas: geografio, astrologio, turismo, muziko. Mi deziras korespondi. S-ino Bożena Slezak, ul. Piotrkowska 182/505, PL-90.368 Łódź, Pollando.**

★ **Mi estas 17-jara studento. Mi dezirus korespondi (laŭeble kun samaĝuloj) pri vivo, junularaj problemoj, historio kaj diversaj temoj. F-lo Jaroslav Jàna, CS-53944 Proseč u Skutce 165, Ĉeĥoslovakio.**

★ **Mi estas komencantino. Mi havas 58 jarojn, kaj mi estas oficistino. Ankaŭ mia edzo lernas Esperanton. Mi deziras korespondi por ekzerci la lingvon. S-ino Stanisława Narlik, ul. Elbląska 22/12, PL-80.765 Gdańsk, Pollando.**

Por sendi monon al IKUE oni bonvolu uzi unu el ĉi tiuj rimedoj;

1) pere de niaj Landaj Rezentantoj (kies adresoj kutime aperas en la lasta paĝo de ĉi tiu revuo);

2) per la itala poŝta konto 23290000, laŭ la adreso: Centra Oficejo de IKUE, via Berni 9, I-00185 Roma RM, Italio (la pago devas esti esprimata en italaj liroj!); el multaj landoj estas eble sendi monon al tiu poŝta konto, sen komplikajoj;

3) per internacia poŝta mandato, laŭ la adreso: Antonio De Salvo, via Berni 9, I-00185 Roma RM, Italio (ankaŭ en ĉi tiu kazo, la pago devas esti esprimata en italaj liroj);

4) per itala banka ĉeko, aŭ per internacia banka ĉeko pagebla en Italio; la nomo estu: Antonio De Salvo, via Berni 9, I-00185 Roma RM, Italio (se la ĉeko estas je nomo de IKUE, ĝi estas praktike ne enkasigebla); la pago povas esti esprimata en iu ajn komercebla valuto; por ĉiu internacia ĉeko, oni aldonu 5.000 italajn lirojn aŭ egalvaloron pro bankaj kostoj;

5) per bankaj biletoj, en iu ajn komercebla valuto;

6) per la konto de IKUE ĉe U.E.A. (kodo: lkue-v).

## ENHAVO

### EKUMENE

3 Unu korpo en Kristo (B.C.)

### KRISTANE

4 Amas Di' malplenajn manojn  
(Th. Rottbaus)

5 Ho dolĉa Sinjoro (S. Brovelli)

6 Litanio al S. Antono  
(R. Brandstaetter)

7 Enkonduko en la Kristanismanon  
(P.R. - B.C.)

8 La apudvoja kapeleto  
(H. Stosio)

9 Sankta-Vendreda mallumo  
(S. Termes)

10 La Kruco de Kristo  
(W. Mudrak)

10 Sub la Kruco

11 «J» (K. Szakonyi)

### HUMANE

14 Se vi volas pacon, respektu  
minoritatojn (B.C.)

15 Solena deklaro de la indiĝenaj  
popoloj

16 Kial ciganinoj kapablas diveni  
(G. Varga)

17 Du fratoj (Eroŝenko)

17 Homet' (B. Eichkorn)

### MOVADO

18 Pledo por la literaturo

